

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 196/197 (2015:4, 2016:1)

Okt 2015 – Mar 2016

**Belas simpleco,
simplas beleco**

**Freneziga danco
de la hetajro**

Halina Salamon
(Poezia Angulo)

**30 Falsaj Amikoj
en Esperanto**

Babilado kun...
Alexandre Raymond

Junaĝe, junage

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Eperantista de Rio-de-Janeiro

N-o 196/197 (2015:4, 2016:1)

Okt 2015 - Mar 2016

74-a jarkolekto

Redaktas:

Fernando Pita kaj Allan Argolo

Aranĝas: Allan Argolo

Ĉi-numeraj kunlaborantoj:

Alexandre Raymond, KarEJO

kaj Vinicius Ribeiro

Kovrilo:


Rio Esperantista




Associação Esperantista do Rio de Janeiro

Rua Teófilo Otoni, 135 / 302


telefono: 2467-4296

 aerjrj@hotmail.com
disvastigo.aerj@gmail.com

 www.aerj.org.br

 facebook.com/aerj.esperanto


 youtube.com/user/TVaerj



Rio Esperantista

Informativo da Associação Esperantista do Estado do Rio de Janeiro

Edição quadrimestral setembro - dezembro / 2010



RIO



ESPERANTISTA

OFICIALA ORGANO DE ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO DE JANEIRO No 18

JANUARO - MARTO 1997



Enhavo

- El la Redakcio _____ 3
- Babilado kun Alexandre Raymond ____ 4
- Junaĝe, junage _____ 8
- 30 Falsaj Amikoj... en Esperanto _____ 10
- Halina Salamon (Poezia Angulo) _____ 12
- Freneziga danco de la hetajro _____ 16
- Belas simpleco, simplas beleco _____ 18
- Baza Kurso de Esperanto _____ 21

Karegaj legantoj,

Jen en viaj manoj nova numero de *RE*. Pro diversaj kialoj, tiu ĉi estas duobla numero (196/197). Tamen, la plej grava el ili estas manko de kontribuoj! Malgraŭ nia ofta petado kaj asertado ke nia revuo estas malfermita al ĉiuj kontribuontoj, ŝajne ili simple sin kaŝas aŭ malaperas...

Tio ja kaŭzas problemojn. Ekzemple, preskaŭ ĉio en la numero 195 estis verkita de nur unu homo! Do, ĉar la revuo estis jam malfruiĝinta kaj ni ne disponis sufiĉajn kontribuojn, la redaktejo decidis salti unu trimestron en nia serio kaj solvi du problemojn: manko da kontribuoj por du numeroj kaj, samtempe, malfruiĝo de la revuo mem.

Do, karaj amikoj, ni petEGas al vi: skribu esperante, kontribuu al ĝia kulturo kaj ankaŭ al nia revuo! Tekstigu viajn pensojn kaj sendu ilin al ni; ja ne gravas ĉu vi membras en AERĴ aŭ ne! *Rio Esperantista* ankaŭ estas spaco por vi!

Sed ni jam multe plendis. Se vi legis ĝis nun, estas tempo scii, ke en tiu ĉi numero vi trovos interesan liston de falsaj amikoj. Kelkfoje, tiaj listoj estas grandaj, sed tiu ĉi estas speciala: ĝi temas pri la esperantaj vortoj kiuj similas al portugallaj vortoj, sed signifas tute aliajn aferojn, foje amuzaj, foje interesaj aŭ eĉ ofendaj. Vi estos antaŭ aro da vortoj indaj je scio, ĉar ili povas iĝi konfuziloj al vi kaj al via parolato. (Ĉar la listo estas ja grandega, ĉi-foje vi trovos “nur” tridekon da ili. En la venontaj numeroj vi konos (espereble nur surpapere) pli da falsaj amikoj.

Vi ankaŭ trovos poemojn de unu el la plej dolĉaj poetinoj de nia Esperantlando: Halina Salamon. Sentema kaj ĝentila, ŝia poezio estas vere kortuŝa kaj delikata. Ni ja esperas ke vi ĝuu la poemojn same kiel ni. Ankoraŭ pri literaturo, ĉi-numere Fernando Pita parolas pri la plej interesa libro kiun li iam legis en Esperanto: *Hetajro dancas*, de la poetino Eli Urbanová – tiu libro ja estas ekzemplo de tio ke, en Esperanto, oni povas, kaj devas, paroli pri io ajn!

Alian literaturan kontribuon enkondukas Allan Argolo: temas pri teatraĵo originale verkita en Esperanto de la junulo Vinícius Ribeiro, el Campos dos Goytacazes. Ĉiuj kiuj havis la bonŝancon spekti ĝin, ludata de la aŭtoro mem, konsentas pri la beleco de ĝia simpleco.

Kaj parolante pri junuloj, ankaŭ legeblas intervjuo kun la franca esperantisto Alexandre Raymond. Li parolas pri siaj spertoj kaj sentoj loĝante en Brazilo, pri kontribuoj al la brazila e-movado, kaj donas sian opinion rilate al polemiko kiu ligiĝis al li pasintjare. Kompletigo al la parolo de Alekĉjo estas artikolo de KAR-EJO, raportante kelkajn agadojn kaj estontajn projektojn.

Fine, lasta artikolo parolas pri la nova lermolibro Baza Kurso de Esperanto.

Do, kara leganto, ĝuu tiun numeron de *RE* kaj ne forgesu sendi viajn kontribuojn al ni por la venontaj numeroj, ĉu bone?

La redakta duopo

konfirmiĝis al mi: en la brazila movado estas kelkaj aktivuloj kiuj multe agas, kaj multaj sekvantoj kiuj vivas la movadon. La movado do tre dependas de kelkaj homoj, kiuj tre multe faras. Ankaŭ alia ŝoko estis la kvanto de krokodiloj, ne nur en la riveroj, sed ankaŭ ene de la movado!

RE: *Ĉu tio estis kultura ŝoko por vi?*

AR: Jes, tamen ĝi ne estis la plej granda kultura ŝoko kiun mi travivis en la movado: Antaŭ ol loĝi en Brazilo, mi foje parolis pri Esperanto al neesperantistaj brazilaj geamikoj kaj multaj el ili tiam demandis al mi “*Esperanto? Ĉu vi estas spiritisto?*”... Tio estis mia granda ŝoko, ke plejparto de la movado en Brazilo estas spiritistoj: tio en si mem ne estas problemo, tamen en la kapo de multaj neesperantistaj brazilanoj ekzistas granda konfuziĝo kaj miksiĝo inter “Esperanto” kaj “Spiritismo”.

RE: *Sed tio estas fakto, granda parto de la esperantista movado estas ligita al spiritista movado.*

AR: Efektive, tio foje havas sian avantaĝon: spiritista movado posedas lokojn, posedas spacon, kiun ili ĉiam pretas disponebligi al esperantista movado, ofte bonpreze aŭ eĉ senkoste, kaj tio permesas facile organizi

eventojn kaj disvastigon. Samtempe, tio plikreskigas la konfuzon inter Esperanto kaj Spiritismo por la ekstermovada mondo. Sed ĝenerale mi ne povas plendi: la movado estas por ĉiuj homoj.

RE: *Baldaŭ vi kompletigos du jarojn loĝanta en nia bela urbo Rio-de-Ĵaneiro, ĉu vi havas la saman impreson pri la loka movado?*

AR: Jes kaj ne. Vidu, la movado en Rio-de-Ĵaneiro dependas de malgranda kvanto de homoj kiuj multe laboras, kaj multaj sekvantoj kiuj faras ke la eventoj estas ĉiam homplenaj. Mi ankaŭ estis pozitive surprizita pri la granda kvanto de esperantistaj junuloj en Rio-de-Ĵaneiro, multe pli ol en kiu ajn urbo, kiujn mi vizitis en la tuta mondo.

La ŝtato Rio-de-Ĵaneiro ne estas tiom granda (laŭ brazila vasteca skalo), tamen kion mi plej rimarkis estis granda manko de aktivaĵoj por tiuj ĉi multnombraj junuloj. Tiam, antaŭ pli ol unu jaro, ni komencis cerbumi kaj emis krei grupon. KKE kaj AERĴ organizas multajn eventojn: prelegojn, renkontiĝojn, festojn, promenaĵojn, sed kion ni vere volis, estis io vere por la junuloj. Do ni kreis grupon kaj komencis aktiviĝi: KarEJO, la Karioka Esperantista Junulara

Organizo. Ni ĉiam ricevis tre fortan kaj pozitivan subtenon de AERĴ kaj KKE. Ni komencis organizi renkontiĝojn, piknikojn, promenadojn al akvofalo, kaj tiel plu.

RE: *Kaj kiuj estas la pozitivaj konsekvencoj de tiu nova grupo?*

AR: Ĉirkaŭ ni, ni sukcesis arigi multajn junulojn, kiuj jam montris iom da intereso pri Esperanto, kaj ni fieras pri la fakto ke multaj el ili nun iĝis aktivaj membroj de nia ŝtata junulara movado: kaj mi vere certas ke KarEJO sukcesas kreskigi la movadon. Fakte, nia grupo rapide kreskis kaj ni tiam havis ideon krei semajnfinan kurson: SERPo, kiu entute okazis dufoje kaj per kiu ni intruis Esperanton al ĉirkaŭ 40 homoj.

RE: *Ha jes, tiu renkontiĝo eĉ eksplodigis internan skandalon pro la nomo. Ĉu vi emas rankonti pri tio?*

AR: Tio estis ŝtormo en glaso de akvo. Unu el la grandaj zorgoj de KarEJO estas oferti renkontiĝojn ankaŭ en lokoj, kiuj ne troviĝas en la centro aŭ la suda parto de la urbo Rio-de-Ĵaneiro, por ne malfavorigi homojn kiuj loĝas for de la urbocentro, en granda zorgo pri neŭtraleco, do. En septembro de la pasinta jaro, ni do decidis organizi tiun kurson, SERPo,

en la kvartalo Campo Grande, pro tri grandaj kialoj: unue, ĝi estas for de la urbo-centro kaj tio estas grava por ni favorigi ankaŭ periferiajn kvartalojn; due, ni tie povis ricevi grandan kongresejon senpage; kaj trie - kaj plej grave, ni jam havis tie grandan grupon de neesperantoparolantaj geamikoj kaj konatuloj kiuj volis lerni Esperanton.



Kelkaj partoprenantoj de la 1-a SERPo

Tiam venis la momento elekti nomon: kaj omaĝe al la kampara deveno de la kvartalo, Kampo Granda, ni elektis inventi nomon laŭ la plej tipa kampara objekto, serpo. La nomo estis demokratie voĉdonita dum kunsido kaj granda plimulto aprobis ĝin. Pluraj monatoj poste, kelkaj tagoj antaŭ la realiĝo de la renkontiĝo, dum preskaŭ ĉio estis preta, tiam ni ricevis minacan leteron, kiu rekte akuzis min esti despoto ene de KarEJO, despoto

kiu volis “komunistiĝi” la movadon. Tia kalumnio estis perfida atako de homoj kiuj, laŭ mia opinio, ne akceptas, ke eksterlandano partoprenu en ilia nacia movado. Laŭ mi, tiuspeca naciismo havas nenian lokon en movado esperantista.

Varbilo por SERPo

RE: *Sed de longa tempo vi estas maldekstra aktivulo, ĉu ne?*

AR: Prave, kaj mi ne povas nei tion: mi estas internaciisto, mi favoras al egaleco, al solidareco, al pli bona mondo, pli egaleca, pli paca, pli kuna. Tamen mi estas serioza homo kaj mi faras klaran distingon inter la politika movado kaj la esperantista movado. Sed oni ja devas rimarki, ke estas forta kongruo inter ambaŭ: dum politike mi emas al pli da homrajta egaleco, mi lingvistike emas al pli da lingva egaleco, kaj laŭ mia opinio nur Esperanto permesas tion homrajte atingi.

RE: *Kiel vi povas do klarigi tiujn atakojn?*

AR: Brazilo nun vivas grandan politikan krizon, kie grupo de konservativaj homoj ne akceptas ke malriĉuloj ne plu vivu en mizero, kaj malgraŭ tio, ke ili estas malplimulto, ili forte atakas kaj kalumnias homojn kiuj ne pensas same kiel ili. Mi analizas tiujn atakojn kiel esperantista speguliĝo de tiu krizo kiu gangrenas Brazilon ekde longa tempo: tiuj homoj ne akceptis ke Esperanto iru al homoj el malriĉaj kvartaloj, kaj decidis ataki kaj kalumnii eksterlandanon, kiel propeka kapro kiujn la konservativuloj ŝatas inventi, kaj pro tio ili pentris min kiel la cerbo de tiu tuta komploto “komunistigi” la movadon, imagante simbolojn en kio ajn, kiel vidi en la nomo de la renkontiĝo “SERPo” la klaran markon ke estas diabla despotismo kiun mi trudas al la movado. Amuzas vidi, ke kun la sama sinteno, konservativaj homojn atakas kiun ajn kiu vestas ruĝan ĉemizon pro la sama kalumnia akuzo esti “komunisto”. Tio estas ekzakte la sama logiko!

RE: *Ĉu tiuj atakoj malfortigis la grupon?*

AR: Tute male, ĝi permesis al ni klare esprimi nin rilate al religia kaj politika neŭtraleco, ĝi permesis, ĉefe, krei fortan solidarecon internan, ĉar ĉiuj niaj membroj pli grupiĝis kaj do

pli fortiĝis, sed ankaŭ eksteran, ĉar ni ricevis fortan subtenon de TEJO: la prezidanto de TEJO eĉ sendis subtenan leteron al nia asocio: imagu kian fortan senton ni travivis troviĝante subite sur la internacia scenejo kun subteno de la plej alta asocio de la esperantista junulara movado: ni ricevis internacian rekonon!

RE: Ĉu vi opinias ke la politika kaj religia neŭtraleco estas grava en la movado?

AR: Jes, tio estas vere grava por la movado. Tio ne signifas, ke la homoj ne devas havi politikan aŭ religian opinion; tio signifas ke ili ja povas havi politikan aŭ religian opinion, sed ke tio ne gravas por konstrui la mova-

don. Mi pensas ke tiuj homoj, kiuj atakis KarEJO-n kaj ankaŭ min, ne kabablas distingi kio vere estas neŭtraleco, kaj kial ĝi tiom gravas por la movado.

RE: Kaj lasta demando: vi baldaŭ revenos al Francio, kion vi deziras por la estonteco de la brazila aŭ loka movado?

AR: Mi deziras ke ĝi kresku, ke ĝi plifortiĝu, mi deziras ke KarEJO daŭre organizu renkontiĝojn, eventojn, kursojn, mi deziras ke ĝi sukcesu daŭre esti neŭtrala kaj aktiva, mi deziras ke multaj novaj homoj aperu el ĉiuj partoj de la socio, sendepende de iliaj politikaj kaj religiaj opinioj.

Junularo *Junage, junage*

KarEJO

En la pasinta jaro, rimarkinte, ke aperadas pli kaj pli da junaj esperantistoj kiuj ne konatiĝas kun la movado, ni la kariokaj junuloj elpensis fondi organizon por ni: KarEJO.

Kelkfoje ni aŭdas, ke ekzistas junan esperantiston, sed neniun movadano konas tiun misteran junulon. Krom tio, ni pensis, ke estante junularan grupon, certe pli facile novuloj intere-

siĝos pri la movado (kaj pri e-o).

Post kelkaj diskutoj kaj kunsidetoj, ni fine fondis ĝin en marto 2015, do, ni jam 1-jariĝas kaj, kvakam novaj, ni jam havas signifajn atingojn.

Ni organizis 2 “imersiajn” kursojn (la SERPoj), tiel ke ni sukcesis arigi multajn junulojn por studi la lingvon, ludi kaj amuziĝi pere de ĝi. Kelkaj el ili ekaktivis, kelkaj estas ne tiom akti-

vaj pro aliaj okupoj kaj kelkaj ne multe plu interesiĝas, kio esta normala afero. Inter la novaj aktivuloj, estas Tamiris Queiroz kaj Arthur Guilherme, kiuj aliĝis al nia estraro, t.e. neformala grupo kiu prenas sur sin la taskon realigi la eventojn.

Indas mencii, ke eĉ homoj aliŝtataj (kaj italo, kiu eklernis kun ni!) ĝuiis SERPon, kio estas stimulo por ili plue lerni nian lingvon.

En KKE, ni gvidis kurson al interŝanĝantaj studentinoj angla (baratdevena), franca kaj rumena. Ĉi-lastata eĉ disvolvas magistriĝan tezo pri esperanto, laŭ social-psicologia aliro.

Ni organizis piknikojn, kulturalan aktivaĵon pro la teatraĵo *Hamlet ou morte* kaj ekskurson al la inaŭguro de *Museu do Amanhã*. Tiuoportune, Renata Ventura invitis siajn legantojn kuniĝi al ni. Ni ankaŭ ofte partoprenas en la eventoj de la Poliglota Klubo de Rio-de-Ĵanejro kaj, en ĉiuj okazoj, ni disvastigas esperanton per juneca kaj

amikema maniero. Menciindas ankaŭ nia konstanta interreta agado kaj la partopreno de kelkaj junuloj en la pasintjara Bienalo.

De movada vidpunkto, KarEJO firmiĝis kiel ŝtata sekcio de Brazila Esperantista Junulara Organizo, kicevas konstantan apogon de AERĴ kaj KKE kaj havas reprezentanto ĉe EKOR.


Kiel porestantaj planoj, ni intencas daŭrigi ĉiujn agadojn menciitajn, ĉefe la kursojn SERPo, ĉi-jare okazonta novembro. Ni ankaŭ planas akiri monon memstare, por subvencii partoprenon de junulojn en e-eventoj (sed donacoj ĉiam estos bonvenaj!).

Laste sed tute ne balaste, ni informas ke rezulte de partnerado inter KarEJO kaj la Informadika Laboratorio por Edukado (LIpE/UFRJ), komenciĝos kurso de esperanto kadre de sociinkluziviga projekto en la Federala Universitato de Rio-de-Ĵanejro, danke al laboro de la karulo Arthur.



Supre: Vespera ludado dum SERPo 1
Maldekstre: Kunsido de KarEJO en KKE

Ĉiuj lingvoj prezentas falsajn amikojn (malfeliĉe, ne nur lingvojn, ĉu ne?), kaj Esperanto ne estas fremda al tio. Falsaj amikoj estas tiuj vortoj, kiuj sugestas al ni ion tute malsimila al tio kion ili ja



signifas. Por ke vi ne plu estu trompita de tiuj falsaj esperantaj amikoj, ni senmaskigos hodiaŭ tridekon da ili. Aliaj aperos en la venontaj eldonoj, ne maltrafu!

Por ke vi pliriĉigu vian vortprovizon, ni ankaŭ prezentas al vi la ĝustan vorton, por ke vi bone kapablu distingi ilin, ĉu bone? Do... ek al legado!

1. **Adulto**, ne estas adulto nek plenkreskulo, sed *malfidelulo*.
2. **Aluno**, ne estas tiu, kiu devintus studi, sed nur *sulfato de alumnio kaj kalio*.
3. **Armadilo**, ne estas kaptilo, sed nur la besteto *tatuo*.
4. **Boa**, ne estas bona nek nomo de biero, sed *persono kiu parencas al vi per ajna edziĝo*, ekzemple: *Maria estas boa parencas mia*.
5. **Caro**, ne estas la prezoj en la merkato, sed la titolo de iama *rusa imperiestro*, la *tsar*.
6. **Cedo**, ne estas frua nek frue, sed *ago de tiu kiu cedas*.
7. **Distrito**, ne sinonimas al polic-ejo, sed rilatas al *senatentigita homo*.
8. **Eco** ne estas eĥo, la ripetiĝo de iu sono, sed la *kvalito aŭ karaktero de io aŭ iu*.
9. **Emo**, tiu vorto ne elmontras tiujn ploremajn junulojn kun haroj falantaj super la okuloj, sed simple *tendenco*.
10. **Envio**, ne estas sendo de io pere de poŝto, sed la terura sento *deziri havi tion, kion alia posedas*.
11. **Firma**, tute ne signifas entreprenon, sed *rilatas al io fortika, stabila*.
12. **Formiga**, ne estas tiu laborema insekto, sed *eco de formado*.
13. **Gado**, ne rilatas al bovaro, sed al tiu *fiŝo* kies kapon neniu konas.
14. **Gasto**, ne estas simpla elspezo, sed *vizitanto akceptata ĉe hejmo aŭ en hotelo*. (Fakte, gastoj ĉiam elspez(ig)as, ĉu ne?)
15. **Kafeterio**, estas strange, sed ne similas al kafejo: ĝi estas tiuj *restoracioj* kie klientoj deprenas mem de la bufedo la manĝaĵon.

16. **Kostumo**, bonvolu ne konfuzi tiun vorton kun la vorto moro: ĝi estas *vesto propra al difinita nacio, ofico, cirkonstanco, k.a.*
17. **Luto**, ne estas la moro vesti sin per nigraj kostumoj pro ies morto, sed *veldo, la tekniko por kunfiksi du metalajn pecojn.*
18. **Makarono**, tute ne estas nia italdevena makaronio, sed *frandaĵo*, eĉ pli bongusta, *el pistitaj amandoj!*
19. **Mato** ne estas herbo, sed io kion oni uzas por kuŝi sur ĝi, *kovraĵo aŭ tapiŝo el pajlo k.s.*
20. **Ombro**: tiu ĉi estas facila, ĉu ne? Oni ne parolas pri la korpoparto liganta brakon al trunko (tio estas ŝultro), oni parolas pri *malhelaĵo, lumo-manka loko.*
21. **Papo** ne estas la kropo de birdoj, sed titolo de la *ĉefo de Katolika Eklezio.*
22. **Pato** neniel rilatas al la birdo kiun oni rostas kun oranĝoj: ĝi estas *malprofunda kaserolo servanta por friti.*
23. **Povo**, signifas ne popolon, sed *la kapablo ion fari, pro forto, lerto aŭ rajto.* La povo nur el la popolo venas.
24. **Preta** ne estas koloro, sed *eco de io disponebla por tuja uzo aŭ de iu en taŭgaj dispozicio por tuj fari ion.* Do, ne estas racismo diri ke “iu estas preta”!
25. **Rodo**. Certe vi ne uzus ĝin en via domo, sed via domo eble povas stari apud unu, ĉar rodo estas *akvopeco ŝirmita kontraŭ la vento, kie ŝipoj povas sendanĝere haltadi.*
26. **Sapo**, tiu ĉi estas eĉ amuzaj falsamiko. Sapo ne estas besto, sed *lavpurigilo*, kiun vi (espereble) uzas kiam vi sin duŝas.
27. **Silvio**. Tiu ne estas nur la estro de la televid-entrepreno SBT, sed ankaŭ *birdo* neekzistanta en Brazilo.
28. **Transa**: Tiu vorto ne signifas tion pri kio via malpura menso pensis, sed *econ esti trans io.*
29. **Vaka**: Ne uzu tiun vorton por paroli pri via bopatrino aŭ eksedzino, ĉar ĝi nur signifas ke iu loko estas *libera, neokupita.*
30. **Veado**: Finfine, tiu vorto ne signifas tiun beston tre valora sed kiu havas tre malbonan famon, sed ja *veoj kiuj daŭras.*



En tiuj ekzemploj estas pliaj falsaj amikoj, se vi sukcesis trovi ilin, bonvolu retpoŝte anonci sin al la redaktejo por ricevi vian premion!

Fernando Pita



En la pasinta numero de *RE*, mi parolis pri la kurso kiun mi sekvas en Poznano. Bone, kion mi tiam ne diris estis, ke, je la fino de ĉiu vintra februara studsesio oni organizas etan, unu-tagan vojaĝon al proksima urbo. Ĉi-foje oni vizitis Vroclavon, sude de la lando. La urbo estas belega kaj la oportuno koni lokajn esperantistojn estis neforgesebla. Tamen, la plej agrabla surprizo estis, ke, inter la lokanoj estis Halina Kuropatnicka-Salamon.

Kiu? Bone, tiuj kiuj legas kion mi skribas eble jam rimarkis, ke la esperanta literaturo estas, por mi, la plej

grava donaco ĝis nun ofertita de Esperanto al la mondo. Kompreneble, kiel ĉiu literaturo, ankaŭ la esperanta havas siajn grandajn verkistojn, siajn majstroverkojn ktp., kaj, same kiel ĉiu literaturo, estas multe da balasto ĉe ni. Ĝuste pro tio, mi, kiu, ĝis tiam, neniam estis aŭdinta pri ties nomo, konfesas mian singardemon kiam oni diris ke “olda blinda sinjorino, kiu estas poetino deklamos siajn verkojn” Tuj mi ekpensis: “ho ve, denove poemoj pri katoj kaj genepoj...”

Tiel, miaj karaj, vi neniam povos imagi kun kia surprizo mi aŭdis Halinan deklami siajn poemojn! Kia digniteco! Kia forto! Kia kapablo konstrui belegajn bildojn kun tiel simplaj vortoj! Kian fundan impreson kaŭzis, en mi, aŭdi ŝian mildan voĉon legition, kion ŝiaj fingroj diktis al ŝi...

Nur poste mi sciis, ke Halina estas ankaŭ famekonata poetino en la pola, kaj ke ŝiaj verkoj, en tiu lingvo, estas daŭre agnoskitaj kiel valoraj. Resume, mi eliris el la renkonto tute

ravita, kaj devigita repensi miajn Estas kelkaj poemoj el tiu menciita
ideojn pri la mildeca forto de ina poe- verko kiuj mi reproduktas al vi nun,
zio, tiel kiel ĝi evidentiĝas en Halina por ke vi povu, almenaŭ per legado,
Kuro-patnicka-Salamon, kiu fine, ĝui (preskaŭ) la saman plezuron kiel
donacis al la ĉeestantoj, ekzempleron mi. Ĝuu ilin!
de sia poemaro *Gutoj de Renkontoj*.

Rememorante

Mia voĉo ne salutas jam viajn matenojn.
Mia ombro en ĝardeno sidas tute sola.
Viaj herboj eĉ forgesis miajn paŝotuŝojn.
Do kial alarme, alarme sonoril' sonas?

Dum vespero ventoj flustras ĉirkaŭ via domo.
Unu seĝon rememoro okupis viola.
Estus granda trankvileco en laca animo,
sed ĉiam alarme, alarme sonoril' sonas.

Noksilento kvietigas dolorantajn lipojn,
nur sub fingrojn ies larmo eksonis malmola.
Ne vekigu, ne paliĝu antaŭ nova tago.
Ne helpo! Alarme, alarme sonoril' sonas.

Mia strato

Kvazaŭ nekuraĝa kiso, mallonga strateto.

Alte, alte melodie de hirundaj kantoj.

Sub murego en herboj sidiĝis lekantoj.

Ho, ankoraŭ estas mia balkoneto.

Ĉio ĉiam ŝajnas dormi en milda silento;

laŭtaj paŝoj maltrankvile vekas helan horon.

la mano sub pordo forlasis rozfloron.

Ĉu al vi mi danku, ĉu al freŝa vento?

Vizitoj

Viaj brakoj venas kun vespero,
kiel lumoplena ammistero.

Via buŝo venas kun tagiĝo,
kiel plej sekreta purpuriĝo.

Viaj vortoj en flustro oriĝas.
Poste ĉiam, ĉiam mi vekigias.

Preĝo de anĝelo

Homoj, teraj gefratoj!
Aŭskultu mian vokon:
sendu disfloran ĝojon
al unu ĉielloko,
kie en maltrankvilo
daŭras mia amiko,
plena de atendado,
 doktoro Ludoviko.
Certigu lin finfine,
ke vivis li nevane;
ke frazojn verde-vortajn
jam uzas eĉ infanoj.
Vespere avoj flustras,
al nepoj rakontante:
– iam, imagu,
 oni ne konis Esperanton.

El la libro: **Halina Kuropatnicka-Salamon**
Gutoj de Renkontoj, Skonpres, 2013.

Mi havis tiam nur 3 jarojn kiam mi lernis legi, kaj mi ĉiam dankos al la geaktoroj de *Vila Sésamo* mian alfabetigon kaj la amon al lernado, kiujn ili penetrigis mian spiriton kaj kiuj, iamaniere, fasonadis mian tutan vivon. Ĉar, se hodiaŭ mi estas instruisto, la semo el tio ja estis plantita en mi de tiuj homoj. Do mi fiere konfesas, ke mi estas vorema leganto!


Kaj ĉar mi estas vorema leganto, al mi ĉiam kaŭzis grandan malkuraĝigon rigardi la esperantan literaturan panoramon: en ĝi, kiam mi estis junulo, mi neniam trovis librojn egalvalorajn al tiuj trovintaj en aliaj lingvoj: mankis al la esperanta literaturo – almenaŭ al tio kion mi tiam konis – la vivantecon de la hispanlingvaj, la ĉarmeco de la francaj, eĉ la ĉiutagaĵojn tiel bone priskribitaj de miaj preferataj usonaj aŭtoroj... do al persono alkutimiĝinta al aŭtoroj kiel Caio Fernando Abreu, James Baldwin, Gabriel García Márquez, Jorge Luis Borges, kaj tiom da aliaj kiujn mi legis junaĝe, la esperanta literaturo, mi devas diri, ĉiam montriĝis al mi kiel sensanga, senviva tekstaro, tute ne kapabla emociigi min samnivele al la ĵusmenciitaj aŭtoroj.

Do, dum multe da jaroj, mi kultivis

ambiguan rilaton kun la esperanta literaturo: mi devigis min aĉeti librojn, almenaŭ por helpi lokajn grupojn; mi devigis min legi ilin, eĉ se post 4 - 5 paĝoj ili montriĝis terure malaltkvalitaj, malplaĉaj, laŭ la plej malbonaj kriterioj konataj de iu kiu dediĉis sian vivon al studado de literaturo(j); kaj, plie, kelkfoje kun neeltenebla religieca, moraleca tono, kiun al mi gustas sukereca ĝis naŭziga punkto.

Fakte, nur en la lastaj jaroj, kaj pro la favora kurzo, kiu faciligis al brazilanoj aĉeti librojn el eksterlando; kaj pro reta aliro al e-literaturaj diskut-rondoj, kiu iel orientas nin rilate al novaj talentoj, mi finfine povis malkovri alian flankon de nia esperantlingva literaturo: tiuj aŭtoroj pri kiuj oni multe legas en internaciaj revuoj, sed kiuj oni malmulte konas. Tiamaniere mi povis renkontiĝi kun Eli Urbanová.


Esperanta poeto, aŭtorino de diversaj libroj, premiita en diversaj beletraj



Hetajro dancas

327 p.

Fonto - Chapecó, 1995



Eli Urbanová

konkursoj de Esperantujo, Eli Urbanová estas ankaŭ la plej interesa verkistino – oni emfazu la sufikson “ino” – kiun mi jam legis en esperanto.

Hetajro dancas, ŝia membiografio, estas valora

almenaŭ pro tri kialoj: historia priskribo de la transiroj de ŝia lando Ĉeĥio dum la dudeka jarcento: de la nazia invado eĉ antaŭ la Dua Mondmilito ĝis la fino de la Fera Kurteno, tra la sovetia invado en 1968, kiu detruis la tielnomitan “Pragan Printempon”. Por tiuj, kiuj volas iom kompreni la historion de tiu lando, kaj eĉ de Orienta Eŭropo, tiu libro estas bona enkonduko.

Plie, ĝi ankaŭ priskribas ŝian esperantan vivon, ekde la unuaj klasoj ĝis la publikigo de ŝiaj libroj, kaj la tuta panoramo de nia tiutempa movado, kun partopreno de elstaruloj kiel Julio Baghy, William Auld kaj aliaj, ĉi-foje ne plu la “eminentuloj” de nia historio, sed kiel simplaj homoj, kun siaj homaj malperfektaĵoj. Tio estas, ŝi

iamaniere kontribuas por la restarigo de tiuj homoj en ilia homa kondiĉo, anstataŭ la mitoj konstruitaj ĉirkaŭ ili.

Sed la plej gravaj kontribuoj de tiu membiografio estas: la nuda priskribo de ŝia vivo: profesiaj rilatoj, malfeliĉa edziniĝo, seksaj rilatoj – kaj preferoj! – ktp, ĉar la libro aŭdacas tuŝi “senkliŝe, senprude kaj sentabue” temojn kiujn la esperanta literaturo unuavide ĉiam preferis flankenlasi.

Alia granda kontribuo estas la riĉa, bunta, kaj senriproĉa lingvo de la verkistino, kiu uzas Esperanton laŭ la flua kaj sinonimhava varieco predikata de la tielnomata “praga skolo”. Kie oni trovos taŭgajn ekzemplojn por uzado de prepozicioj *cis*, *sob*, *sor* kaj aliaj nekutimaĵoj? Kompreneble, tian lingvouzon iel malaprobos bonlingvistoj, sed tio tute ne estas problemo por mi: ĉiuj esprimeblecoj de la lingvo estas je nia dispono, kondiĉe ke oni estu sufiĉe spertaj por ilin uzi. Do, kial resti ĉe la marbordo, se la granda aventuro estas en la oceanoj? Tion faras Urbanová, kaj mi diras al vi, ke estas belega aventuro legi ŝian biografion: pro la rezonoj prezentitaj, vi certe malkovros ŝokan libron, kiu eble ŝanĝos vian sintenon pri Esperanto, kiel ĝi ŝanĝis la mian, ĉar la danco de la hetajro estas freneziga.

Kio necesas por bona teatraĵo? Elpensu la plej simplan respondon kiun vi kapablas.

Eble vi trovis difinon por la teatraĵon nun enkondukata: la skeĉo *Roka Kastelo*, verkita originale en esperanto de la juna aktoro Vinicius HPR. Laŭ li, ĝi apartenas al la ĝenro *Malriĉa Teatro*, kiu forpelas ĉion ne nepran al la prezentado kaj valorigas la rilaton inter aktoro kaj publiko

kaj iliajn kreemon kaj imagemon. Rezultas minimumisman arton, kun malmulte da fizikaj elementoj sed plena je sento. Kaj la talenta Vinĉjo sukcesis realigi tion, premiere dum la 9-a Esperanta Kongreso de Ŝtato San-Paŭlo kaj poste dum la 51-a Brazila Kongreso de Esperanto.

Finfine, ni invitas vin al gustumado de tiu teatra frandaĵo. Fantaziu *Rokan Kastelon!*

Roka Kastelo

Mi dediĉas tiun skeĉon al Fernando Maia Jr., la unua homo kiu spektis ĝin. – Vinicius HPR

Sceno I – Koridoro

La Barbaro kuras, falas kaj vidas la soldaton

Barbaro – Do, vi metos min malliberejen, ĉu ne?

Soldato – Bedaŭrinde mi arestos neniun hodiaŭ. [*Mortigas la barbaron*]

Rakontisto – Por plibone kompreni kio ĵus okazis tie ĉi, oni devas ekrakonti el la komenco. Ni estas en la reĝlando Blanka Kampo, kiu estas regata de la juna reĝo Gustavo. Apud la Reĝo, ĉiam estas lia konsilanto, Ĵesmundo.

Sceno II – Salono de l' Reĝo

Reĝo – Mi povas senti. Estas io en la aero... Io kontraŭ mia vivo. Ĵesmundo!
Ĉu vi havas ion por diri?

Ĵesmundo – Jes! Reĝo mia... sed... bedaŭrinde ne estas tiom bona. Estas unu profetaĵo! Iu el la barbara familio venos ĉe vi, kaj viaj okuloj ne plu estos malfermitaj.

Reĝo – Iu el la barbara familio... provos mortigi min. Mi sciis ke estis io! Mi ne povas resti trankvile ĉe mia kastelo kiam miaj malamikoj estas ekstere!
[*La reĝo pensas iomete*] Ĵesmundo! Voku ĉiujn soldatojn. Ordonu ke ili trovu kaj kaptu ĉiujn barbarojn.

Ĵesmundo – Jes! Reĝo mia, jes! Sed... Kion oni devos fari post la kapto? Ĉu meti ilin malliberejen?

Reĝo – Ne. Oni arestos neniun hodiaŭ.

Ĵesmundo – Kompreneble reĝo mia! Kompreneble! [*Foriras*]

Reĝo – Iu el la barbara familio... venos... che mi... Mi estas la reĝo Gustavo! La krono estas sur mia kapo! Neniu, neniu prenos ĝin! Mi reĝas kaj la krono restos sur mi!

Rakontisto – Post tio, la reĝo kune kun la aliaj soldatoj forlasis la kastelon por trovi kaj mortigi ĉiun barbaron. En eta domo la reĝo trovis inon, barbarinon, kaj trafte mortigis ŝin. Surplanke li vidas kaj prenas etan bebon.

Sceno III – Domo de l' Barbarino

Reĝo – Soldato! Tiu-ĉi bebo estas barbarido, kaj certe estas mia malamiko... Tamen, li estas tiom juna... mi ne povas vundi lin... [*Pensas iomete*]
Prenu! Metu lin malliberejen en Roka Kastelo. Kiam li havos 20 jarojn... li konos sian destinon.

Rakontisto – Laŭ la volo de la reĝo, la bebo iris malliberejen, kaj li vivis. Ĵesmundo, la konsilanto de la reĝo, estis la ununura homo kiu rajtis eniri tien por paroli, kaj kunporti manĝaĵon al la barbaro. 20 jaroj pasis... kaj li neniam vidis la eksteran mondon... 20 jaroj.

Sceno IV - Malliberejo

Barbaro – Jen mi, Dio, por kompreni... kiajn krimojn mi faris kontraŭ vi? Sed, se mi naskiĝis, mi jam komprenas kiajn krimojn mi faris. Ĉar la plej granda krimo de la homaro, estas naskiĝi. Tamen, por plibone kompreni, mi volis scii pri miaj aliaj krimoj... ĉu ne naskiĝis aliaj? Se aliaj naskiĝis... kial ili havas privilegion, kiun mi neniam ĝuis?

Ĵesmundo – Kion vi faras? Chu vi preghas? Chu vi ne rimarkis ke Dio neni-am helpos vin? Dio ne amas barbarojn! Dio malamas vin! Sed mi komprenas... la fido estas ĉio, kion vi havas. Se mi estus vi, mi dankus... Vi devus danki al la reĝo Gustavo. Ĉar pro li vi nun estas tie-ĉi, vivanta! Danku! Danku al la reĝo!

Barbaro – Danki? Ĉu mi devas danki al la homo kiu forprenis mian vivon? Mian liberecon? Danki? [*Kraĉas sur la vizaĝon de Ĵesmundo*]

Ĵesmundo – Se vi ne volas danki, ne danku! Jen (Prenas la manĝaĵon) mi kunportis vian manĝaĵon. [*Lasas ma pladon surplanke, sed Ĵesmundo forgesas la ŝlosilon tie*] Fartu bone. [*Ĵesmundo ekeliras sed haltas*] Ho! Mi preskaŭ forgesis... Feliĉan naskiĝtagon!

Barbaro – Ĉu hodiaŭ... naskiĝtago... 20... jaroj... [*Ploras kaj prenas la manĝaĵon sed ne sukcesas manĝi. Sur la plado, kie estis la manĝaĵo, estas ŝlosilo*] Ki... kio? Ĉu ŝlosilo? Ĉu... Ĵesmundo... forgesis... ĝin?

Maltrankvile kaj timeme, la barbaro prenas la ŝlosilo, malfermas la malliberejon kaj foriras

Rakontisto – Finfine! Post 20 jaroj, la barbaro estas, finfine, libera! Kurante tra la kastelo, li trovas apenaŭ malfermitan pordon kaj eniras. Sed estis iu tie... La reĝo Gustavo kuŝis.

Sceno V – Ĉambro de la Reĝo Gustavo

Barbaro – Ĉu estas iu tie-ĉi? Jes!... Tiun kronon... mi konas... Ĉu reĝo Gustavo? Reĝo Gustavo! La homo kiu forprenis mian vivon... kuŝas... trankvile kuŝas.

La barbaro mortigas la reĝon kaj forkuras. Eniras Ĵesmundo ĉambren

Ĵesmundo – Pardonpetas mi, reĝo mia, sed la barbaro... [*Vidas la reĝon surplanke*] Mia reĝo? Ĉu vi... dormas? Mia... reĝo? [*Aproksimiĝas kaj konstatas ke la reĝo estas mortinta*] Aĉulo! Aĉulo! Soldatoj! Soldatoj! Aĉulo! Jes mi vokis! Vidu, la reĝo estas mortinta! La barbaro estas libera! Trovu lin, arestu lin, mortigu lin! Aĉulo! [*Foriras*]

Sceno VI – Koridoro

La Barbaro kuras, falas kaj vidas la soldaton

Barbaro – Do, vi metos min malliberejen, ĉu ne?

Soldato – Bedaŭrinde mi arestos neniun hodiaŭ. [*Mortigas la barbaron*]

FINO

Fernando Pita



Baza

Kurso de Esperanto

80 p., CBLIE - San-Paŭlo, 2015

Dum nia pasintjara partopreno en la Bienalo de Rio kelkaj libroj estis lanĉitaj, kiel la *Kompleta Gramatiko de la Tupia Lingvo*, de Lorenz; la brazila eldono de la *Fundamento de Esperanto*, de Zamenhof (tradukita Túlío Flôres), kaj la *Baza Kurso de Esperanto*, ver-

kita de tiu kiu nun skribas kun la celo klarigi, interalie, kial tiu libro estis kreita.

En la historio de nia movado instruometodoj ja abundas. Kelkaj el ili estas jam longdaŭre uzitaj kaj ĉiam prezentas bonajn rezultojn. Tamen, la plejmulto el tiuj libroj simple ne akompanis kaj la modernigon de metodologio pri instruado de lingvoj kaj la modernigon de la ĉiutaga vivo. Fakte, ĉe ni estas kelkaj metodoj ankoraŭ de la 80-aj jaroj, libroj pere de kiuj mi mem lernis, sed kiuj neniam estis ak-

tualigitaj. Do, pere de ili, nienu lernos vorton, simplan sed ĉiutagan, kiel “poŝtelefono” aŭ “komputilo”.

Alia granda problemo en Brazilo estas disdonado de lernolibroj: fakte se estas bonega libro en, ekzemple, Sud-Riogrande, oni nenion scios pri ĝi en Rio-de-Ĵanejro. Kaj, eĉ se ni scios, estas tre malfacile akiri sufiĉan kvanton por esperanto-kurso.

Tria problemo estas prezo: kiel por ĉiu ajna lingvo, bona lernilo ne estas malmultekosta, ĉar ĝia eldonado ja postulas bonan grafikan prezentadon, buntan kaj koloran; k-diskon kun la tekstoj enregistritaj; kaj ankaŭ videoj bonvenas. Tio ja postulas monon kaj reflektiĝas en la prezo mem. Tamen, kontraŭe al tio, kion oni jam faras por lerni la anglan aŭ la hispanan, multaj el tiuj, kiuj eklernas Esperanton, devis antaŭ ĉio esti konvinkitaj pri ĝia taŭgeco, kaj eĉ se ili decidis “provi” tiun lernadon, ili ne pretas pagi multon por ekhavi libron. Do, esperanta libro ja devas: a) esti malmultekosta (eĉ se oni iom perdas pro tio), b) facile akirebla de esperanto-grupoj (do oni devas havi grandan eldonkvanton) kaj c), bazita sur la plej modernaj pedagogiaj tendencoj.

Por solvi tiujn tri problemojn mi, dum kelkaj jaroj, serĉis diversajn vojojn, sed ĉiuj eblaj solvoj, finfine, kreis tiom da novaj problemoj kiom ili solvis la antikvajn, do mi ne trovis alternativon krom mem verki didaktikan libron kiu provas renovigi la brazilajn instrumentadojn por Esperanto. Fakte tio ja postulis de mi multe da laboron, kaj ankaŭ de la reviziistoj Ivan Colling kaj Rita de Moraes – kiuj bonkore kaj helpeme prenis sur sin la dolorigan taskon poluri miajn multajn fuŝaĵojn – kaj de la grafika aranĝisto José Tenório, estrarano de EASP, kiu respondecas pri la belega kovrilo de la libro (kies nura malbelaĵo estas mia foto, kiu almenaŭ povos esti uzita por terurigi infanojn). Al ĉiuj, mi kore porĉiame dankos!

Sed decido lanĉi novan libron same alportas al ni novan problemon: multaj instruistoj estas jam ĝisoste alkutimiĝintaj instrui esperanton laŭ tia aŭ tiu alia metodo, kaj ja strangas kelkaj

proponoj kiuj aperas en *Baza Kurso de Esperanto* (proponoj kiuj, oni sciu, estas jam komunaj en alilingvaj materialoj). Pro tio, mi ofertas trejnkursojn al tiuj, kiuj volas instrui la lingvon pere de tiu metodo; tiel ĉiam estas kontakto inter instruisto en klaso kaj la aŭtoro mem, pri kio la lernantoj profitas.



La komiksiisto Carlos Ruas kaj mi, dum Bienalo

Fine, mi estus kompleta hipokritulo se mi ne konfesus mian feliĉon kaj fieron komuniki al vi ĉiuj, ke tiu libro estis la plej vendita varo ĉe nia budo en Bienalo. Dankon al ĉiuj aĉetintoj!

Ni informas ke, laŭ decido de la estraro de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro, la tutan rentumon havigitan de la Asocio pere de la libro *Baza Kurso de Esperanto* restos por la kampanjo *Esperanto en*

Bienalo 2017, kiu celas al kolekti la sufiĉan monkvanton por ke Esperanto denove ĉeestu la 18-na Internacian Libro-bienalon de Rio-de-Ĵaneiro, en septembro 2017.

La Estraro

AERJ

Itinerante



Dia 23/04 (sáb) às 17h30 no La Espero Esperanto-Grupo
Rua Coronel Agostinho, 126 – Campo Grande.

Oportunaj varoj por via bretaro
atendas vin en nia
libroservo!



27^a Ŝtata Esperanto-Renkontiĝo de Rio-de-Janeiro

Rio-de-Janeiro • 14 - 15 majo 2016

Daŭripova Evoluigo kaj Esperanto

Renkontejo

Colégio Francisco de Assis,
Rua Goulart de Andrade, 221, Realengo – Rio-de-Janeiro

Informoj kaj Aliĝoj

disvastigo.aerj@gmail.com

Realigo:



Associação Esperantista do Rio de Janeiro
Rua Teófilo Otoni 135/302 — Centro, RJ
(21) 2467-4296 | disvastigo.aerj@gmail.com

Apogo:

**COLÉGIO
FRANCISCO de ASSIS**